


NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn

de la Norda Federacio kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements

de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo :

18, rue Albert 1^{er} - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro-Prirespondanto

G. VANHOVE, Administranto

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj

aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POSTĈEKKONTO : LILLE 403-50

C. VERNAY, DUNKERQUE

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2 a Serio - 16 a Jaro

N° 1

NOVEMBRO 1938

20^e CONGRÈS FÉDÉRAL D'ESPERANTO

FRESNES - SUR - ESCAUT

||| 13 et 14 Mai 1939 |||



Statingeniero Edouard HOUZÉ,

Generala Sekretario de la Esperantista Grupo en Dunkerque.

Li ĵus ricevis, pro liaj multnombraj klopodoj favore al la disvastigo de Esperanto, la arĝentan medalon de la "Société pour l'encouragement au Bien". Notinde estas ke la Prezidanto de tiu ĉi Societo estas ankaŭ Esperantisto. La medalo estis transdonita al nia amiko Houzé dum festo al kiu partoprenis ĉiuj aŭtoritatoj. Kiel oni vidas, pli kaj pli, Esperanto, estas favore akceptata de la oficialaj rondoj en Francujo.

20^{ma} CONGRÈS FÉDÉRAL (FRESNES-SUR-ESCAUT)
de la Fédération Espérantiste du Nord de la France

ALVOKO

Karaj geamikoj,

Venonta federacia Kongreso okazos en Fresnes-sur-Escaut la 13an kaj 14an de majo 1939. La loka komitato jam multe klopodis kaj ankoraŭ multe klopodos por ke tiu kongreso havu grandan sukceson.

En Fresnes kaj ĉirkaŭe oni faras gravan propagandon. Sed karaj geamikoj, se oni povas bone organizi, la sukceso estas tamen ebla nur se la aliĝaj listoj plenigas 100 aliĝojn ni nun havas. Ne estas sufiĉe, ĉar por havigi subtenon de la urbestro, la Prezidanto promesis ke 500 gesamideanoj ĉeestos la kongreson.

Do aliĝu jam ! Aliĝu ankoraŭ !! Aliĝu ĉiam !!! Tio estas la sola, la vera afero kius devas gravi por vi hodiaŭ.

Ni esperas ! (ĉar ni estas en Esperantujo). Vi venos multnombraj en Fresnes por bone montri al niaj samurbanoj, ke Esperanto vivas kaj kreskas ĉiam kaj malgraŭ ĉio.

Farante tion, vi bone laboros por nia afero. Ni jam elkore dankas al vi.

E. NINAUVE,

Prezidanto de la Fresnes-a Grupo.

ALĜANTOJ A LA KONGRESO

UNUA LISTO

- | | |
|-----------------------------------|-------------------------------------|
| gesinjoroj : | 23. Vanherseeke (S-ino), Dunkerque. |
| 1. Vernay Claude, Dunkerque. | 24. Cougel B. (F-ino), Dunkerque. |
| 2. Ballenghien M., Bachy. | 25. Charmette, Arras. |
| 3. Delcourt M., Gravelines. | 26. Charmette (S-ino), Arras. |
| 4. Kert A., Boulogne-sur-Mer. | 27. Tyveyra A. (F-ino), Arras. |
| 5. Houzé E., Malo-les-Bains. | 28. Lambotin, Quiévrechain. |
| 6. Max M., Lens. | 29. Lekieffre, Anzin. |
| 7. Max (S-ino), Lens. | 30. Volqueman, Lille. |
| 8. Fernon S. (F-ino), Dunkerque. | 31. Volqueman (S-ino), Lille. |
| 9. Dormieu A. (F-ino), Dunkerque. | 32. Hulin, Phalempin. |
| 10. Braure (S-ino), Dunkerque. | 33. Degand G., Dunkerque. |
| 11. Lemoine R., Dunkerque. | 34. Humez A., Douai. |
| 12. Aucerne Ch., Lille. | 35. Humez S. (S-ino), Douai. |
| 13. Aucerne (S-ino), Lille. | 36. Rampanaux, Jeumont. |
| 14. Cocquerez E. (F-ino), Lille. | 37. Prangère, Douai. |
| 15. Morlinghem, Hémin-Liétard. | 38. Prangère (S-ino), Douai. |
| 16. Cogez D., Douai. | 39. Dumarquez A., Desvres. |
| 17. Spys G. (F-ino), Dunkerque. | 40. Dumarquez (S-ino), Desvres. |
| 18. Brunet P., Arras. | 41. Deligny E., Saint-Omer. |
| 19. Curnelle R., Lille. | 42. Deligny (F-ino), Saint-Omer. |
| 20. Centnersver J., Valenciennes. | 43. Dammerey G., Porre. |
| 21. Colléate A. (F-ino), Amiens. | 44. Deveyer, Hazebrouck. |
| 22. Colléate J. (F-ino), Amiens. | 45. Roussel, Amiens. |

46. Mauran L., Marpent.
47. Stuit S., Arras.
48. Stuit (S-ino), Arras.

49. Sourdeau, Flines-les-Mortagne.
50. Favre R., Boulogne-sur-Mer.

(Aliĝo al la kongreso (5 fr) povas esti sendata al S-ro Ninauve, 75, rue Emile-Zola, en Fresnes-sur-Escaut, (Nord).

ANGULO DE LA LEGANTO

REDONU AL ALIAJ TION, KION ONI DONIS AL NI

Mi rememoras ke mi legis en memoraroj de Franklin : « Kiam mi pruntedonis iom da mono al amiko, mi neniam repostulas ĝin de li; sed mi promesigas al li ke, kiam li renkontos senmonan amikon, li faros saman servon, ankaŭ promesigante al li, ke li daŭrigos la ĉenon. Sankiel mia unua servo okazigos multajn aliajn, ĝis kiam renkontinte malhonestulon li haltigos ĝin ».

Tio bone montras inteligentecon kaj koran noblecon de supera homo.

Estas same pri lernado de Esperanto. Mi malavare, ricevis lecionojn de miaj profesoroj. Mi, eĉ iom konkrete, dankis ilin, kaj mi, plezurege, memorigas kelkajn nomojn : Trotin, Curnelle kaj André, el Lille ; Houzé kaj Dorp, el Dunkerque ; Deligny, el St-Omer ; Brunet, el Arras ; Tardieu, el Levallois-Perret, k.t.p. Sed mi ne sentas min kvitigita kontraŭ esperantista familio. Mi, jam, havis dekon da lernantoj ; mi promesigis al ili fari same, kaj iuj komencis. Mi neniam estus supozinta ke mia unua lernantino, F-ino Armande Vis, el Hesdin, nun en Arras, lernigus esperanton al mia nevino, Georgineto Desmarest, precize en Arras. Tiu ĉi, siavice, instruos aliajn ; jam ni parolis pri ŝiaj gefratoj pli junaj. Certe, aliaj esperantistoj faris multe pli bone ol mi. Tamen, mi komencis lerni Esperanton je la sesdekoka, kaj, antaŭ morti, mi havos plezuregon vidi sufiĉe multnombrian esperantistan familion.

Ĉiuj, tiel faru, kaj baldaŭ Esperanto triumfos.

H. DESMAREST.

* * *

EL LILLE'ANO

Post longa libertempo, post dormado de la Grupo kaj disirado de multaj grupanoj, ni revenas al la esperantista grupa vivo, aŭ tutsimple al la Vivo !

Cu reveno de malproksime ? Certe jes ! Ĉiuj same ! Kelkaj faris longan belan vojaĝon kunportante ekstere de sia Grupo la esperantajn parolon kaj instruadon al novaj samideanoj kiuj volis kunigi turismon kun esperantismo tra diversaj landoj.

Sed finfine ĉiuj, nevole, faris vojaĝon ne longan sed teruran, ĝis abismo kies profundecon ili havis tempon por mezuri, kaptturniĝe, evitante ekstretempe forfalon funden.

Reveninte de tiu danĝera... ekskurso, ni denove renkontiĝos, des pli plezure, en luma varma ĉambro, kiel kutime, sub la verdaj radioj de nia stelo, anstataŭ ol en la frostaj kotaj cimentfortikaĵoj, tra la sangfluo, sub la ruĝaj bombfulmoj de la militatmosfero.

La lingvo de la pacantoj do plue vivos, almenaŭ dum ia tempo,

kaj ankoraŭ ne fariĝos, ĉe ni, lingvo por pravigo de la milito antaŭ la mondo. Post terura minaco, ni rehavos kunvenojn ĉiusemajne aŭ monate kaj pace povos aŭdi alilandajn prelegantojn, kiuj parolos, antaŭ belaj pacigaj humbidoj, pri landoj, kies loĝantoj ankoraŭ povas paroli kaj dormi libere, forlasante sian pafilon, kaj manĝi buteron... malproksime de la mutaj kanonoj, por kiuj ili ofertas ankoraŭ ne tutan sian monon...

Ni ne forgesu, ke Esperanto devas esti unue paclingvo.

M. VOLQUEMAN.

EL LITOVA POEZIO

Tradukis kaj kompilis P. Lapiéné. — 200 paĝa, 19×12 cm.
Prezo : 3 lid., 0,50 U.S.A. dol., 2 š. 6 p., 2,5 sv. fkj., 18 fr. fr., 1 ned., gul. — Sur pli bona papero : 4 lid., 0,75 U.S.A. dol., 3 šil., 3 sv. fkj., 24 fr. fr., 1,3 ned. gul.

HAVEBLA ĉe *Litova Esperanto-Asocio*, Zemaičiu 15 ; Kaunas 9, Litovujo.

Dum Francoj bedaŭras, ke ankoraŭ ne aperis la delonge sopirata "Franca Antologio", malgranda lando, Litovujo, kun literaturo apenaŭ 200-jara estas denun bone reprezentata en nia tradukita poeziaro.

La jusaperinta plaĉaspekta libro meritas ĉies atenton. Post enkonduka artikolo, kiu liveras al ni informojn pri la litovlingva literaturo kaj notetojn pri ĝiaj poetoj, la libro dividiĝas en du partoj : 1° anonimaj "popolaj kantoj", ĉarme naivaj versaĵoj, el kiuj kelkaj majstre tradukitaj de Grabowski kaj Dombrovski. La 2a parto, titolita "arta poezio" estas multe pli interesa, la kvindeko de la tie reprezentitaj poetoj preskaŭ unuanime sopiras al liberigo de sia patrujo. Per la varma voĉo de siaj bardoj la dumlonge subpremita popolo, kiu dum 40 jaroj ne rajtis eĉ presigi ion en sia lingvo, vokas nin al kunsento. Volonte, mi citos multajn paĝojn por komprenigi la animon de tiu popolo ; vi nur legu la tradukon de ĝia nacia himno, klare montranta la noblan aspiron al paco kaj klerigo.

Tiu libro estas vere frukto de ŝato al la poezia belo, kiu devas instigi eĉ simplanimajn homojn al grandaj agoj :

Kaj kiu al agoj
junulojn admonus,
se guzloj en manoj
de bardeĵ ne sonus ?

Ĉu iu konsolus
orfinan la koron,
forviŝus de l'vangoj
la roson doloran ?

La gloron heroan
ĉu iu atentus,
ĉu viglus animo,
se guzloj silentus ?

Alia poezio titolita "Sur lago" estas el vera Lamartine'a melankolia liriko. Sed mi ne kuraĝas citi ĉiujn menciindajn titolojn.

Ankaŭ ĉarmaj versoj el simpla sento estas troveblaj sub la nomo de Saloméja Néris. Ni citu nur "La Kiso" :

Via kiso abrupta estis brula kaj loga,
kvazaŭ fulmo subita, svena kvazaŭ noktter'.
Ho, potenca la tento ! Por sanktuloj provoko...
Por mi kiso la via la ŝtelita fajrer'.

Pri la lipoj ardantaj ne plu estos forgeso —
ili signon bruligis ĝis la fundo de l'kor'.
Kaj enlulis la penson per ebrio freneza —
kiel sklav' ĉe vi restos ĝi dum tag' kaj nokthor'

Ne serpento min mordis — kisis lipoj min flame
kaj ĝis ostoj penetris frostotrema vibrad'.
Ne forgesos mi plu, ĉar mi scias, ke same
via pens' kaj pasi' — la komuna brulad'.

Oni povas nur bedaŭri, ke, ofte la rimoj estas neperfektaj. Kial ekzemple rimigi nur la akcentitan silabon : *palpebro*, *funebra*, *vento*, *silenta*, kaj lasi ke la lasta vokalo misefiku ? Kun iom pli da prilaboro tio estus facile evitebla. Stranga kaj netaŭga estas la elizio de la pronomo "kio", paĝo 25 : Pro ki'.

Sed tio estas nu detaletoj, apartaĵoj de tiu aŭ aliu tradukinto, kaj ne forprenas la valoron de la libro.

Fine, mi volas mencii la nomon de prelato Dombrovski, kiu multe tradukis esperanten el sia lingvo kaj estas konigita ankaŭ per siaj litovlingvaj poezioj sub la pseŭdonimo Adomas Jakŝtas, en la tempo kiam li devis presigi siajn librojn eksterlande pro la rusa malpermeso. Ŝajne, la litovaj samideanoj heredis el la ĵusmortinta eminentulo la amon al la belo, kiun li montris dum sia tuta vivo.

M. DELCOURT.

SUPERA KURSO

Pour répondre au désir plusieurs fois formulé par nos samideanoj, candidats au "Supera" et au "Kapableco", nous sommes heureux de reproduire ci-après, à leur intention, quelques conseils judicieux pouvant les aider dans leur préparation à ces examens.

Nous continuerons, dans nos prochains numéros, la publication des ces intéressants articles, qui, nous l'espérons, plairont au plus grand nombre de nos lecteurs qui désirent se perfectionner.

Nous remercions bien vivement "La Lerninto", notre excellent collaborateur, qui se cache modestement sous ce pseudonyme.

LA RED.

PREDIKATIVO (L'Attribut)

L'attribut se met au *nominatif* comme le sujet.

1. — *Qu'est-ce que l'attribut ?*

C'est un mot qui indique une qualité ou un état qu'on *attribue* au sujet du verbe ou au complément du verbe.

2. — *L'attribut se rapporte au sujet du verbe :*

a) avec le verbe être. Ex : *La ĉielo estas blua* (blua est attribut de ĉielo) ;

b) avec un verbe intransitif exprimant un état : *farigi*, *ŝajni*, *naskigi* et tous les verbes en *igi*.

Ex : *La ĉielo farigas blua* (blua est attribut de ĉielo) ;

c) avec un verbe passif :

Ex : *Li estis balolita deputito* (deputito est attribut de li).

REMARQUES. — 1° Un verbe est dit "à sens intransitif" quand l'action ne passe pas du sujet sur un complément, autrement dit quand le verbe se suffit à lui seul pour exprimer l'action ou l'état. Ex : Paul dort. Les questions : qui ? quoi ? quel objet ? employées à l'école primaire pour trouver le complément d'objet restent alors sans réponse.

2° Un verbe est à la forme passive quand il exprime une action subie, supportée par le sujet. On reconnaît un verbe à la forme passive à ce qu'il est conjugué avec l'auxiliaire *être* et que les temps simples de sa conjugaison deviennent composés. Ex : Verbe à la forme passive : *Être aimé* donne au présent de l'indicatif "*Je suis aimé*" et au passé composé "*J'ai été aimé*".

3° Ne pas confondre les expressions "formes" et "sens" des verbes. Il y a trois formes pour les verbes : f. active, f. passive et f. pronomina-tive, et deux sens : sens transitif et intransitif. Nous en parlerons encore plus tard.

3. — *L'Attribut se rapporte au complément d'objet.*

Après certains verbes qui signifient attribuer par la parole, par la pensée ou par l'action.

a) Attribuer par la parole (verbes appeler, dire, nommer, proclamer traiter).

Ex : Si nomis ŝin sia *filino* : elle la nomma sa fille (filino est attribut du complément ŝin).

b) Attribuer par la pensée (verbes croire, juger, penser, reconnaître pour, etc.).

Ex : Mi juĝas tiun viron *honesto* : Je juge cet homme honnête (honesto est attribut du complément tiun viron).

c) Attribuer par l'action (verbes choisir, élire, faire, laisser, rendre, etc.).

Ex : La reĝo faras lin *estro* : le roi le fait chef (estro est attribut du complément lin).

On ne se borne pas à constater une qualité que possède le complément, on lui attribue une qualité.

Pratiquement on reconnaît l'attribut quand on peut sous-entendre le verbe *Être* avant lui. Ex : Mi juĝas ke tiu viro estas honesta.

Le français marque la différence par la place de l'adjectif. Ex : Je trouve bon ce vin = Je trouve ce vin bon, mais non "Je trouve ce bon vin".

LA LERNINTO.
(daŭrigota).

TRA LA GRUPOJ

AMIENS

La 4-an de septembro multnombraj lokaj gesamideanoj partoprenis ekskurson al Villers-Bretonneux kaj ĉirkaŭaĵoj. Oni vizitis kune la belan monumenton "Mémorial de Villers-Bretonneux".

Dum la lastoj monatoj okazis geedziĝoj inter niaj gesamideanoj : S-ro Léopold Léger kaj F-ino Justine Andrzejewski ambaŭ gvidantoj de Esp. kursoj ; S-ro Raymond Guénard kaj F-ino Marcelle Lefebvre ; S-ro Gacquer kaj F-ino Andrée Riquier ; S-ro Delbruyère kaj F-ino Marcelle Niquet ; S-ro Pierre Laudon kaj F-ino Christiane Chantemesse.

Al ĉiuj sincerajn gratulojn kaj bondezirojn.

NEKROLOGO. — F-ino Gertrude Hansen, Ĉe-Profesorino, kiu instruis en Anzin, Amiens, Longueau, Albert, mortis en Kolding (Danujo), la 20-an de septembro. Si estis sindonema kaj gajnis la simpation de siaj gelernantoj.

Ni sendas al sia familio niajn tre sincerajn kondolencojn.

ANZIN

Dimanche, le 11 septembre à l'issue de leur réunion mensuelle les Espérantistes de la région valenciennoise se sont rendus au cimetière d'Anzin sur la tombe de leur regretté ami Gaston Langlé, victime d'un terrible accident de travail, que nous avons relaté en son temps. Ils y déposèrent un magnifique souvenir et une superbe gerbe de fleurs.

Arrondissement de VALENCIENNES

Les cours d'Esperanto ont repris au début d'octobre à Valenciennes, Anzin, Denain, Trith-St-Léger, Raismes, Bruay, Wallers, Thiers, Fresnes-sur-Escaut, Onnaing, St-Saulve, Vieux-Condé. Les détails seront publiés dans le prochain numéro.

ARRAS

Ekde oktobro funkcias la jenaj kursoj :

Por komencantoj : en Komerca Cambro ĉiumarde de la 18-a ĉ. 45 ĝis la 20-a kaj en la Knaba Lernejo, rue de St-Quentin ĉiuvendrede de la 20-a k. 15 ĝis la 22-a, gvidanto S-ro Brunet. Perfekta kurso : en la Komerca Cambro ĉiun duan jaŭdon de la 20 k. 15 ĝis la 22-a. Dum la aliaj de jaŭdoj de la monato je la samaj horo kaj loko okazas grupkunvenoj. La lernolibroj kiujn ni uzas estas : por komencantoj : *Illustrata Kurso de Szilagy-Waringhien* kaj por progresantoj "*Cours Pratique*".

AVESNES

Pro la forveturo de la grupsekretario S-ro Ernest Mariez, la grupo ekdormetas. Ĉiujn korespondaĵojn koncerne la grupon bonvolu sendi al S-ro Noé Copin, rue du Collège, Avesnes.

BOULOGNE-SUR-MER

Dum julio okazis en nia urbo granda katolika manifestacio "La Nacia Mariala Kongreso". Tiokaze estis eldonitaj specialaj esperantistaj glumarkoj kaj flugfolioj. Sekve de tio kelkaj eksterlandaj kongresanoj vizitis nian grupon kaj profitis de niaj servoj.

BOURBOURG

Perfektiga kurso rekomenciĝis la 11-an de oktobro por la lernantoj kiuj regule vizitadis la kurson de la pasinta jaro.

DESVRES

Publika kurso de Esperanto por plenaĝuloj komencos en la Centra Lernejo, la 26-an de oktobro. Ĝin gvidos S-ro Dumarquez.

Kiel en la antaŭa jaro, S-ro Dumarquez ricevis de la distrikta Inspektoro de Bulonjo, S-ro Huin, la permeson instrui Esperanton en ambaŭ klasoj de sia komplementa kurso.

DUNKERQUE

Ni ne ricevis raporton pri la agado de tiu Grupo.

NEKROLOGO. — La 7an de julio mortis nia fervora samideano Albert Caer. Jus antaŭ lia morto li estis skribanta kortuŝan leteron, en Esperanto, al iu el niaj grupanoj.

S-ro A. L. Willaert, filo de nia antaŭmilita samideano Willaert, mortis la 23an de septembro.

Al ambaŭ familioj ni prezentas niajn sincerajn kondolencojn.

HÉNIN-LIÉTARD

Dum la libertempaj monatoj la nova grupo vigle laboris. Dum junio : ĉiumarde okazis kunvenoj, ludoj kaj perfektiga kurso gvidata de S-ro Mériaux ; la 27-an funkciis budo sur la strato dum la jarfoiro (Branerie) ; rezultato : 70 libretoj disvenditaj. Dum julio : la 5-an, parolado de F-ino S. v. de Wijgert, sekretariino de la Esp. grupo de Dordrecht (Nederlando) ; la 29-an ekskurso al Vimy.

LILLE

Le secrétaire du groupe M. Volqueman a passé ses vacances à Salanches à l'École d'Été organisée par le Gr. Esp. de l'Enseignement. Cette école a réuni 70 élèves et notre ami y dirigeait le cours élémentaire pour une quarantaine d'élèves. Nos félicitations.

LENS

Dum junio funkciis speciala elementa kurso por 25 ĝeinstruistoj. Tiun plejsukcesan kurson, kiu finiĝis la 29-an de julio gvidis S-roj Dubois kaj Erjavec. La 24-an de julio, 33 grupanoj ekskursis al Phalempin kaj la 29-an de aŭgusto kelkaj Lensaj gesamideanoj partoprenis la ekskurson al Vimy, organizitan de la grupo de Hénin-Liétard. Ankaŭ plensukcesa estis nia ekskurso la 4-an de septembro al Aubigny-au-Bac. La unua leciono de la vintraj kursoj okazis la 18-an de oktobro je la 20-an en la Urbodomo.

PONT-SUR-SAMBRE

Ateston pri kapableco akiris S-ro Broutin kaj Ges-oj Buronfosse. Superan pri Lernado : S-ino Broutin, F-ino Anceaux kaj S-ro Lemaire. Ateston pri Lernado : Soj Sclavon kaj Colmont kaj F-ino Fauchez. La 26-an de junio nia grupo partoprenis ekskurson al Liessies organizitan de la grupo de Jeumont.

FRESNES-SUR-ESCAUT

La propaganda festo, kiu devis okazi la 25-an de septembro ne okazis pro la cies-konataj cirkonstancoj. Ĝi estas prokrastita ĝis decembro. Ambaŭ kursoj por komencantoj kaj perfektiga komenciĝis la 12-an de oktobro. Ili estas gvidataj ĉiumerkrede je la 19-a k. 30 en la Urbodomo de S-roj Centnerŝver kaj Léchelle laŭ rekta gramatika metodoj.

SAINT-OMER

Dum la disdono de premioj en la Liceo la premioj de Esperanto-kurso estis enskribitaj en la oficialan premiliston. 16 junaj lernantoj sukcesis en la ekzameno por Atesto pri Lernado. Iliaj nomoj ankaŭ estas enskribitaj sur la premilisto kaj la liceestro persone disdonis la atestojn. En la Urba Biblioteko la Esperantista fako estis plurfaje vizitata.

VALENCIENNES

Les cours commenceront le jeudi 3 novembre prochain probablement à l'Hôtel de Ville. Ils seront professés par M. Centnerŝver suivant la méthode directe. Le nouveau secrétaire du groupe est M. Dumont, instituteur, 109, boulevard Sally à Valenciennes.

AVESNES

Post senaktiveca periodo kaŭzita de faktoj sendependaj de la bonvolo de sia estraro, la Avesnes-a Grupo revekiĝis kaj refortigiĝis malgraŭ kelkaj bedaŭrindaj foriroj.

La 20-an de oktobro, S-ro Raymond Couteaux, prezidanto de la Avesnes-a Tribunalo kaj estro de nia grupo malfermis novan kurson antaŭ la malnovaj Esperantistoj kaj preskaŭ dekkvino da aŭskultantoj. Post kelkaj cirkonstancaj antaŭparoloj, li majstre gvidis provlecionon por la novaj gelnantoj kiu valorigis la altajn kvalitojn de nia tiel simpla kaj logika helplingvo. Poste la prezidanto, S-ro Couteaux per kortuŝaj vortoj salutis kaj honorigis la memoron de tre bedaŭrata S-ro Georges Azambre, notario en Maroilles, eksestro de nia grupo kaj maljuna pioniro de la Zamenhofa idealo en nia regiono, kiu mortis antaŭ kelkaj monatoj post longa kaj kruela malsano. Bonvolu lia familio trovi tie-ĉi la reesprimon de niaj plejsinceraj kondolencoj pri tiu neriparebla bato de la sorto.

Tiu varbkunveno tre bone sukcesis ĉar nun ni havas dekduon da novaj gelnantoj inter kiuj estas plejĉarmaj kaj afablaj fraŭlinoj kaj sinjorinoj.

La publika kurso funkcias ĉiujarde je la 8-a horo en la saloneto de la Urbodomo, afable kaj senpage disponigatan al ni de la urbestro. S-ro Couteaux gvidas la kurson laŭ la metodo de prof. Cart.

Noé COPIN.

VIEUX-CONDÉ

Dank'al sindono de kelkaj anoj de la Esp. Grupo de Fresnes kaj post vigla propagando, nova kurso ekfunkciis, komence de oktobro. La kurson partoprenas pli ol 20 gelnantoj ; ĝi okazas ĉiujarde je la 19-a k. 30 min. kaj gvidas ĝin en la Urbodomo, S-roj Fenzy laŭ rekta kaj Léchelle laŭ gramatika metodo.

Baldaŭ estos starigita Esperantista Grupo.

JEUMONT-MARPENT

Sabate la 5-an de novembro okazis granda balo en la Festosalono de la Urbodomo. Prezidis ĝin S-ro Doktoro Riche, urbestro de Jeumont.

FRESNES

Sinjoro Gogert, subpreleto de Valenciennes akceptis la honoran prezidantecon de nia federacia Kongreso.

Ni proponis ankaŭ la honoran vicprezidantecon al S-ro Chopinet, lerneja inspektoro.

NI DAŬRIGU !...

EKSTERORDINARA AVENTURO

(Laŭ P. L. Courier).

Foje mi vojaĝis en Kalabro. Ĝi estas lando de malbonaj homoj, kiuj, mi opinias, nenion amas, kaj precipe havas vengemon kontraŭ la Francoj. Diri al vi kial, tio estus longa; sufiĉas scii, ke ili malamas nin ĝis morto, kaj oni tre malbone pasigas la tempon, kiam oni falas inter iliajn manojn. Mi havis, kiel kunulon, iun junulon kun figuro... vere kia tiu sinjoro, kiun ni vidis en Le Raincy, ĉu vi memoras? Kaj eble ankoraŭ pli bela. Mi ne diras tion por vin interesi, sed ĉar tio estas la vero.

Sur tiuj montoj, la vojoj estas abismoj; niaj ĉevaloj paŝis kun multe da peno, mia kamarado antaŭenirante; vojeto kiu ŝajnis al li pli trairebla devojiĝis nin. Mi estis kulpa; ĉu mi devis fidi al menso dudekjara? Ni serĉis, tiel longe dum lumis, nian vojon tra tiuj arbaroj; sed ju pli ni serĉadis, despli ni devojiĝis, kaj estis tute mallume kiam ni alvenis apud tre nigra domo. Ni eniris en ĝin, ne sen suspekto; sed kiel fari? Tie, ni trovis tutan familion de karbistoj ĉe la tablo, tuj oni invitis nin. Mia junulo ne lasis sin peti: jen ni manĝas kaj trinkas, almenaŭ li, ĉar koncerne min, mi detale pririgardis la lokon kaj la mienon de niaj gastigantoj.

Niaj gastigantoj havis ja mienojn de karbistoj; sed la domo, vi estus rigardanta ĝin kiel arsenalon. Nur pafiloj, pistoloj, sabroj, tranĉiloj, tranĉilegoj. Ĉio malplaĉis al mi, kaj mi bone vidis, ke ankaŭ mi malplaĉis. Mia kamarado, tute male: li apartenis al la familio, li ridis, li babilis kun ili; kaj per nesingardemo, kiun mi estus devinta kalkuli (sed kio! se la fatalo estus volinta...) li unue rakontis de kie ni venis, kien ni iros, kiuj ni estas; Francoj! Imagu nur! en la domo de niaj plej mortaj malamikoj, solaj, elvojrintaj, tiel malproksime de iu ajn homa helpo! Kaj por nenion preterlasi pri tio, kio povus nin pereigi, li ŝajnis sin riĉa, promesis al tiuj personoj por la elspezo-kaj por niaj ĝvidistoj, la morgaŭon, ĉion kion ili volis. Fine li parolis pri sia valizo, insiste petante, ke oni atente zorgu pri ĝi, ke oni metu ĝin ĉe lia litkapo; li ne volas, li diris, alian kapusenon. Ha, juneco! juneco! Kiom via aĝo estas kompatinda! Kuzino, oni opinias, ke ni portas la krondiamantojn!...

La vespermanĝo finita, oni lasas nin; niaj gastigantoj dormis en la malsupro, ni, en la supra ĉambro, kie ni manĝis. Ĉambretaĉo alta je sep aŭ ok futoj, kien oni supreniras per ŝtupareto, jen la kuŝloko, kiu nin atendis, speco de nesto en kiun oni sin enŝovas rampante sub traboj ŝarĝitaj per manĝaj provizoj por la tuta jaro. Mia kamarado sola supergrimpis tien, kaj kuŝiĝis dormeme, la kapo sur la trezora valizo. Koncerne min, decidiinta maldormi, mi faris bonan fajron, kaj sidis apude. La

nokto estis jam sufiĉe kviete forpasinta, kaj mi komencis rekuraĝigi, kiam je horo ŝajnis al mi ke la tago ne povis esti malproksima, mi aŭdis sub mi, nian gestiganton kaj lian edzinon parolantajn kaj interdisputantajn; kaj, klinante la kapon al la fajrejo, kiu komunikis kun tiu de la malsupra domparto, mi perfekte perceptis tiujn proprajn vortojn de la edzo: « Nu, fine, ĉu mi devas ambaŭ mortigi », al kio la virino respondis: « Jes ». Kaj mi nenion plu aŭdis.

Kiom mi diros al vi? Mi restis apenaŭ spiranta, mia tuta korpo malvarma kiel marmoro; vidante min, vi ne estus sciinta ĉu mi estis mortinta aŭ vivanta. Dio! Kiam mi ankoraŭ memoras tion! Ni ambaŭ, preskaŭ sen armiloj, kontraŭ ili, dekdu aŭ dekkvin, kiuj havas tiom da militiloj! Kaj mia kamarado, mortanta pro dormemo kaj laceco! Lin voki, fari bruon, mi ne riskis; min-sole forsavi, mi ne povis; la fenestro ne estis tre alta, sed malsupre du dikaj hundegoj hurlis kiel lupoj... En kia maltrankvilo mi troviĝis, imagu tion se vi povas. Post kvaronhoro kiu estis longa, mi aŭdas iun sur la ŝtuparo, kaj tra la fendoj de la pordo, mi vidas la patron, lian lampon en unu mano, en la alia unu el liaj tranĉilegoj. Li supreniras, lia edzino post li; mi malantaŭ la pordo. Li malfermas, sed antaŭ ol eniri, li metas la lampon, kiun la edzino prenas; poste li eniras nudpiede, kaj ŝi, de ekstere, diras al li mal-laŭte, kovrante per la fingroj la troan lumon de la lampo: « Zorge, iru malrapide ». Kiam li estas ĉe la ŝtupareto, li supreniras, la tranĉilo inter la dentoj, kaj, veninte al la litalteco, tiu kompatinda junulo kuŝanta, prezentanta sian senŝirman gorgon, per unu mano li prenas sian tranĉilon, kaj per la alia... Ha! kuzino!... li ekkaptas ŝinkon, kiu pendis de la planko, tranĉas pecon, kaj retiriĝas kiel li estis veninta. La pordo fermiĝas, la lampo foriras, kaj mi restas sola kun miaj pensoj.

Kiam tagiĝis, la tuta familio, kun granda bruo, venis nin veki, kiel ni tion estis petintaj. Oni alportas manĝojn, oni donas matenmanĝon tre puran, bonegan, mi certigas al vi. Du kaponoj estis alportitaj, el kiuj ni devas, diras nia gastigantino, kunporti la unu kaj manĝi la alian.

Vidante ilin, mi fine komprenis la signifon de tiuj teruraj vortoj: « Ĉu mi devas ambaŭ mortigi », kaj mi imagis al vi sufiĉe da penetremo por diveni nun kion tio signifis.

ADE.

LETERO EL SVEDUJO

Ni ĵus riveras de nia amiko, la jama verkisto sveda Stellan Engholm, la ŝatatan leteron kiun ni estas feliĉaj publikigi ĉi supre.

S-ro S. Engholm kiu, kune kun lia ĉarma edzino partoprenis, pasintan Julion, la someran kurson kaj la Internacian Semajnon en Malo-les-Bains bonvolis fari al ni la grandan plezuron verki "ion" por nia revuo: S-ro Engholm malofte skribas en Esp. revuoj; tamen li faris ekcepton por NFE. Ni tute dankas al li pro lia afableco kaj certigas lin ke ni ne forgesas la belajn horojn plenajn da promesoj kiujn ni havis la plezuron trapasi kun li en Malo-les-Bains.

(Por la novaj Esperantistoj ni diru ke, S-ro Stellan Engholm estas unu el la plej ŝatataj aŭtoroj esp. Inter aliaj bonegaj verkoj li verkis du orignalajn romanojn: "Al Toronto" kaj "Homoj sur la Tero". Multajn gravajn tradukaĵojn li faris. Ni citu la plej majstrajn: "Per balono al la

Poluso" kaj "Gösta Berling", tradukaĵoj kiuj multe kontribuis konatigi la svedan literaturon al la Esperantistoj en la tuta mondo.

LA RED.

26 okt. 1938.

Amikoj!

En la pasinta somero ni renkontiĝis en Malo-les-Bains. Belajn memorojn kaj amikan kunligon ni eksterlandanoj konservas de nia restado inter vi.

Multe okazis post tiu bela julia tago, kiam la trajno forportis nin el Dunkerque. En multaj vesperoj kaj noktoj ni maltrankvile kaj anĝimpremite turnis la butonojn de niaj radioaparatoj por ekscii, kio okazas tie kaj tie en la mondo.

Kaj niaj pensoj estis ĉe vi, amikoj, kaj ĉe amikoj en multaj landoj. Disflugis onidiroj. Tiu defendos tiun, tiu estos kontraŭ tiu. Mi legis la gazeton, kaj mi aŭskultis la komunikojn de la radio, kaj malespere mi diris: « Oni defendas landojn, oni defendas popolojn, oni defendas doktrinojn. Sed kiu defendas la homon kontraŭ la terura krimo farota al ĝi, la simplan, unuopan homon, kiun oni devigos mortigi, devigos esti mortigata, devigos agi rekte kontraŭ tio, kion oni ĝenerale, almenaŭ en trankvilaj momentoj, rigardas kiel la plej altajn aferojn en la interhoma vivo. Kiu defendos la homon, kaj la moralajn kaj ceterajn spiritaĵajn valorojn de la homo? »

Tiu demando estas tre naiva, same naiva kiel la infana rimarkigo pri la vestoj de la imperiestro en la fabelo de Andersen. Sed ĝi estas fundamente grava, kaj ni ne povas eviti ĝin, se ni volas serioze okupi nin pri la demandoj de homoj kaj milito.

Neniu homo havas iun ajn rajton ordoni al alia homo mortigi kaj esti mortigata. Tio estas tre simpla vero, tamen fundamente grava por la demando pri homoj kaj milito.

Mi pensis pri vi, amikoj, kaj pri niaj fratoj en ĉiuj landoj, kaj vole nevole mi diris al mi: « En la nuna momento ni ŝajne nenion signifas en la mondo. Ni estas nur nekonata rondeto da homoj, kiuj praktikas vivon de interhomaj respekto kaj amikeco, kiuj nek postulas nek devigas, sensignifa manpleno da homoj en mondo regata de barbareco kaj torditaj veroj. »

Estas tiel. Kaj nia malgranda rondo ankoraŭ pli malgrandiĝas, dum pligrandiĝas la rondo de fratoj mutigitaj.

Ĉu ekzistas ankoraŭ en nia rondo iom de tiu flamiga entuziasmo por homeco, kiu iam donis vivon al nia lingvo kaj kolektis adeptojn al ĝi, ĉu ekzistas ankoraŭ animoj, kiuj povas ekflami por tiu ideo kaj sindone agadi? Tre necesa estas tiu entuziasmo — tute ne en formo de grandaj gestoj kaj laŭtaj krioj sed kiel trankvila kaj persista agemo, kiu havas sian bazon en la pensoj de la homoj, en ilia tuta spirita vivo. Por atingi sian celon, aŭ almenaŭ atingi parton de ĝi, ideo movado nepre devas havi solidan bazon en la spirita vivo de la homoj, en iliaj konvinkoj, sopiroj kaj aspiroj. Alie ĝi fariĝas nura amuzilo, rimedo por tempopasigo...

Mi duone promesis al la redaktoro de Nordfranca Esperantisto kontribui per kelkaj linioj al la gazeto, kaj pro tio mi skribis tiun ĉi leteron. Ĝi certe ne estas modela letero por esperantista korespondo, sed mi skribis laŭ tio, kio okupas miajn pensojn.

Korajn salutojn! Bonan progreson!

Amike,
Stellan ENGHOLM.

EN LA FEDERACIO

RAPORTO PRI LA KUNVENO DE LA FEDERACIA KOMITATO EN LILLE LA 3-an DE SEPTEMBRO 1938

Ceestas la kunvenon: S-oj Degand (Dunkerque), prezidanto; Dumarquez (Desvres), vicprez.; Chavet, prez. de Lille-a grupo; Centneršver, ĝen. sekretario (Valenciennes); Joye, Dubois, Erjavec (Lens); Mériaux kaj Lonpret (Hénin-Liétard); Prof. Waringhien kaj F-ino Tondelier (Lille).

Senkulpigis: S-roj Deligny kaj Humez honoraj prezidantoj; F-inoj Barret kaj Colléatte, vicprezidantinoj; S-roj Le Petit (Boulogne); Volqueman kaj Curnelle (Lille); Popiol (Fresnes); Brunet (Arras).

S-ro Degand prezidas la kunvenon. S-ro Dumarquez legas la protokolon de la antaŭa komitata kunveno en Malo. La protokolo estas aprobita.

Antaŭ ol pridiskuti la demandojn laŭ la tagordo, S-ro Chavet sciigas la Komitaton ke li ricevis leteron de Lille-a societo "L'Union de la Jeunesse", kiu organizas ĉiujare Esperanto-kurson gvidatan de S-ro Curnelle. Dum speciala ceremonio la societo disdonas premiojn al la plejmeritaj lernantoj de diversaj kursoj aranĝitaj de tiu societo. Ankaŭ la esperanto-kursanoj devas esti rekomencitaj kaj la societo petas la federacion donaci kelkajn librojn tiucele.

S-ro Degand plenumis la peton de la societo.

1.) Ĉiuj esp. grupoj organizas kursojn por la komencantoj, sed la gravaj demandoj kiuj estas starigataj ĉiujare antaŭ la komenco de la nova studjaro estas la elekto de taŭga profesoro kaj la metodo laŭ kiu la kurso devas esti gvidata. Komprenibile la plej efika estas la rekta metodo, precipe kiam la kurso estas gvidata de eksterlanda Cseh-instruisto. Ankoraŭ pli bone estus se iu loka profesoro povus gvidi kurson rektmetodan. Tamen tuj poste aŭ samtempe devas funkcii gramatika kurso. Rekomendinde estas ke la gramatik-metoda kurso estu gvidata de profesia instruisto. Nur se la grupo tute ne havas iun kapablan gvidi rektmetodajn lecionojn kaj la monrimedoj ne permesas venigi eksterlandan Cseh-instruiston, tiam la pure gramatika metodo povas esti uzata, ĉar estas pli bone fari ion ol nenion. Cetere se ne estas surloke profesoro, oni povas sin turni al la najbara plejproksima grupo, kiu certe povus rekomendi unu el sia profesoroj. Ekzemple, tia aranĝo okazis inter Hénin-Liétard kaj Lens.

Tamen ni povas konstati, ke dank'al ĉiujare organizataj Cseh-kursoj en diversaj urboj de nia federacio kaj precipe dank'al la someraj kursoj en Malo ni havas sufiĉe da profesoroj kapablaj gvidi kurson ĉu laŭ rekta metodo ĉu laŭ duone rekta, duone gramatika.

Sed ne sufiĉas nur krei novajn esperantistojn, oni ankaŭ devas enkonduki tiujn novajn elementojn en nian Movadon: oni devas ofte aranĝi kunvenojn, perfektigajn kursojn, de tempo al tempo venigi eksterlandan prelaganton, aranĝi gajajn vesperojn kaj letervesperojn, k.t.p.

La grupanoj devas ankaŭ labori ne nur sur la loka sed ankaŭ sur la federacia tereno aranĝi komunajn ekskursojn kun aliaj grupoj, partopreni la federaciajn manifestaciojn, kunvenojn k.t.p. Cetere, la federacio estas ĉiam preta konsili kaj helpi ĉiunmaniere la grupojn kaj izolulojn.

2.) S-ro Dumarquez pretigis planon de la organizado de Cseh-kursoj. Por instigi la grupojn aranĝi tiujn kursojn li intencis viziti dum la ferioj multajn grupojn. Bedaŭrinde, pro de-li nedependaj cirkonstancoj li estis devigata rezigni je tiu rondvojaĝo. Neniu alia grupo krom

Dunkerque-a decidis aranĝi en la venonta vintra sezono Cseh-kurson kun eksterlanda instruisto.

3.) Esperanto-dissendoj de Lille-a Radiostacio. Bedaŭrinde estas ke ili ne plu okazas dimanĉe matene sed sabate je la 14-a horo. Tiuj tago kaj horo tute ne kontentigas nin ĉar nemultaj disponigas liberan teton por aŭskulti la esperantan duonhoron.

Estas necese ke en ĉiuj grupoj leteroj estu sendataj al la radiostacio kun peto ke oni denove aranĝu la esp. disaŭdigon ĉiudimanĉe matene. Prefere tiuj pet-leteroj estu sendataj individue kaj diversdate por ke ili ne ŝajnu esti instigitaj sed ke ili esprimu veran personan deziron de ĉiu esperantisto. La federacio de antaŭe dankas ĉiujn letersendintojn.

4.) M. le Président informe le Comité qu'il a reçu un mandat de paiement de la somme de cent francs émis le 17 juin 1938 par M. le Préfet du Nord et représentant la somme accordée par le Conseil Général du Nord à notre Fédération. Il propose de donner à notre trésorier M. Warusfel à Douai mandat de toucher ce mandat et d'en donner quittance au nom de la Fédération à M. le Trésorier Payeur Général du département du Nord. Cette proposition est votée à l'unanimité et mandat est donné à cet effet à M. Warusfel, trésorier.

5.) Niaj influhavaj samideanoj de la departementoj P.-de-C. kaj Somme estas petataj klopodi energie antaŭ la koncernaj aŭtoritatoj por havigi al la Federacio subvencion de tiuj departementoj same kiel tio okazas en Nord.

6.) S-ro prof. Waringhien atentigas la Komitaton pri la decido alprenita dum la Nacia Kongreso en Romans pri la ekzamenoj kaj pri la kunlaborado sur tiu kampo kun aliaj esperantistaj societoj nealigantaj al S.F.P.E.

7.) La Prezidanto atentigas la ĉeestantojn pri tre bona raporto farita de S-ro Rampanaux (Jeumont). Tiu laboro estis ciklostilita kaj sendita al ĉiu grupo. S-ro Degand profitas la okazon danki publike S-ron Rampanaux pro lia fervoro kaj sindonemo al nia afero.

PENSOJ

Ankoraŭ pli ol la ministro, kiu nenion povas sen lampo, la koro de l' homo bezonas amon kaj idealon.

Laboro bone farita kaj konsciencia : laboro pagita per ĝojo kaj fiereco.

Ni sciu streĉi kaj direkti nian energion, tiam nia vivo fariĝos fruktodona.

Esp. N. NOGÉ.

DOCUMENT OFFICIEL

Dans les Collèges et Ecoles techniques

Après le magnifique succès de l'esperanto lors de la conférence officielle internationale de Paris, en juin 1937, l'attention des pouvoirs publics avait été appelé sur l'utilité croissante de la langue auxiliaire dans la vie moderne.

Cette utilité avait déjà été reconnue çà et là par l'introduction de

cette langue dans différentes écoles et institutions de Bulgarie, Grèce, Japon et même dans une trentaine d'écoles anglaises.

Après une étude attentive de la question, une consécration de toute première importance en est donné maintenant en France par la Direction de l'enseignement secondaire et celle de l'enseignement technique sous la forme de la circulaire ci-après :

Paris, le 11 octobre 1938.

Le Ministre de l'Education Nationale à Messieurs les Recteurs,

« Mon attention a été appelée, à diverses reprises, sur l'intérêt que présente, dès maintenant, et que présentera davantage encore dans l'avenir, la connaissance de l'Esperanto, langue auxiliaire susceptible de faciliter les relations aussi bien entre les intellectuels qu'entre les commerçants et les techniciens des diverses nations.

« J'ai l'honneur de vous faire connaître qu'il me paraît souhaitable de faciliter le développement des études espérantistes. Certes il ne peut être question de donner à l'enseignement de l'esperanto une place dans les horaires des études obligatoires de nos établissements d'enseignement du second degré et dans nos écoles techniques. Mais si des cours facultatifs d'esperanto peuvent être institués, je n'y verrai que des avantages. On peut l'admettre aux Loisirs dirigés.

« Je vous serais obligé de porter ces instructions à la connaissance des chefs d'établissement scolaire de votre Académie ».

Le Directeur de l'Enseignement Technique,

Signé : H. LUC.

Par autorisation :

Le Directeur du Second Degré,

Signé : CHATENET.

Si l'on considère avec quelle défaveur sceptique ou ironique la langue auxiliaire a longtemps été considérée dans de nombreux milieux mal informés de l'enseignement, on apprécie toute l'importance de cette décision, premier pas sans nul doute vers un enseignement généralisé de l'esperanto pendant une année tant pour son utilisation directe que pour la facilité qu'il apporte ensuite à l'acquisition des langues étrangères ainsi que le prouve l'expérience de Bishop Auckland commencée en 1921 et qui se poursuit avec succès.

Recenzo

PRAKTIKA KOMENCA ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO. —

Metodo "Didakta", de Delfi Dalmaŭ, L. K. (2a eldono).

Bona malgranda gvidilo por la komenca lerno de Esperanto. Kiel skribas la aŭtoro, « ĉiu lernanto estas diferenca de la aliaj », kaj la instrukcioj « havas nur ĝeneralan gvidcelon ». Mi mem preferus do specialan lernolibron por ĉiu speciala gepatra lingvo, malfacila estas, ne Esperanto, sed la transiro de gepatra lingvo al Esperanto. Eĉ la "rekta" metodo ne forigas tiun transiron. Ekzemple la akuzativon oni devas akcenti pli en lernolibro por francoj ol en lernolibro por germanoj. Kaj tion oni devas fari jam en la elementa kurso. Nura ripetado de "la knabo-la knabon" ne komprenigos al franco tion, kio ŝajnas natura al alilingvano.

Do en "Didakta", ne kontentigas min la apero de akuzativo en la 3a leciono. Necesus, eble ne klarigo (mi konsentas pri la gramatiko, 8a leciono), sed almenaŭ kompreniga insisto.

Cetere la aspekto ekstera de la libro estas taŭga kaj la desegnaĵoj estas modelaj.

(Prezo : 1 ekzemplero, 1 angla ŝilingo ; 3o ekzempleroj, 1 angla funto. Mendon kaj monon oni devas sendi al la aŭtoro : Delfi Dalmau, Apart. 5o8r Barcelona, Hispanujo.)

CEFEC-SLOSILO NORVEGA.

Laŭ la ĉie konata modelo de tiu praktika helpilo nomata "Cefec-Slosilo" ĵus aperis la 2a eldono en norvega lingvo, zorga reviziaĵo kun pli modernigita vortlisto.

Ĝi estas havebla kontraŭ 1 respondkupono (25 ŝre) ĉe
Norvega Esp-ista Ligo, "Librofako"
Skappelsgt, 3, Hamar.

Konstanta subteno

1a LISTO

Tutkoran dankon al niaj fervoraj samideanoj kiuj per morala kaj mona helpo subtenas nian laboron. Despli kuraĝiga estas ilia helpo ke ni laboras en tute malfavoraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj.

Al la ĉi subaj kaj, espereble, estontaj "konstantaj subtenantoj" nian plej koran dankon :

Lille-anino, pri kaj por la Paco	20
S-ro Bouvier, en le Havre	10
S-ro Tremon, en Caudry	4
Un Dunkerquois, à l'occasion de la Paix	10

Entute 44

TUJ REABONU !

Via abono estas finita, tuj reabonu ! Vi plifaciligos nian laboron, jam sufiĉe malfacila. Samtempe vi utile helpos al ni, al nia revuo, al nia movado, al nia idealo.

Antaŭe dankon !

BULLETIN NORDFRANCA REVUE MENSUELLE
D'ABONNEMENT à ESPERANTISTO DES ESPÉRANTISTES DU
NORD DE LA FRANCE

18, rue Albert-1^{er}, DUNKERQUE. — Chèques Postaux Lille, Vernay 40-35o

Le soussigné (nom) _____

Adresse : _____

déclare souscrire un abonnement d'un an à 10 fr. — Etranger : 12 fr.

J'envoie le montant par Chèque postal — Chèque — Mandat.